

N I A V O Ĉ O

Madrid Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

FEBRUARO 2002

EN APARTA FOLIO ONI INKLUDAS PROTOKOLON DE LA ĜENERALA KUNVENO

ADIÓS PESETA, ADIÓS
Lupe Sanz Bueno

Fue plata tu nacimiento
y rubia tu juventud
y ahora que el euro te aleja
mueres como una lenteja
sin "cambio" y sin gratitud.

¡Ay! Que grande desconcierto
nos trae tu fallecimiento

ADIAŬ, PESETO ADIAŬ
(esperantigis Jesuo de las Heras)

Argentis via naskiĝo,
blondis juneco via,
kaj nun eŭro vin forprenas
kaj lente, sendanke
senŝanĝa vi mortas.

Ve!, kia konfuzo
pro morto via!

EKSTERLANDE

Ĉina Interreta Informa Centro, oficiala ŝtata organo en Ĉinio, oficiale decidis uzi esperanton kiel unu el la laborlingvoj. (www.china.org.cn/world)

Esperanto estas plurfoje menciita en la nova italingva fakverko "Kongresoj kaj entreprenaj kunvenoj. Manlibro por agado" de Gian Carlo Fighiera, estinta Konstanta Kongresa Sekretario de UEA. Tabelo kun listo de la UK-oj de la lastaj 20 jaroj servas kiel modelo de geografia rotacio de internacia kongreso.

ESPERANTO EN INTERNET

Plurlingve pri fabeloj de Andersen kun ligoj al pli ol cent tekstojn e-lingvaj:

//hjem.get2net.dk/chenero/hca

Kataluna muzik-teamo "Kaj tiel plu": //geocities.com/kajtielplu/ktp.html

Revuo "Kajero el la Sudo" //storm.prohosting.com/jesuo/k52.htm

Babilado esperatlingve //karello.komputilo.org

Reta kurso por hispanoj: www.institutoesperanto.com.ar

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

18a-19a majo. Kongreso de la Valencia E-Federacio kaj Murcia. Vall d'Uxo (Castellón).

1a-7a julio. Internacia SAT-kongreso. Alicante.

5a-7a julio. 61-a Hispana Esperanto-Kongreso. Alicante.

11-17 julio. HoRo. Hispana Renkontiĝo (HEJS). Salamanca.

ZAMENHOFA TAGO EN MADRIDO

Kvankam iomete malfrue, oni festis en Madrido la Zamenhofan Tagon, kun amasa partopreno (76) de samideanoj el Madrido kaj ankaŭ aliaj alvenintaj el Valjadolido, Valencio, kaj eĉ unu ĉeĥino. La etoso estis tre agrabla, kaj fine de la tagmanĝo la esperantista koruso "Verda Stelo", sub la gvidado de Pedro Vilarroig kaj Laura Carballo regalis la ĉeestantojn per belegaj kantoj.

NOVA ADRESO

Asociación Andaluza de Esperanto (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) havas novan adreson: strato Armengual de la Mota, 33 - 4º D. 29007 Málaga. esperanto@navegalia.com

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluza Esperanto Unuiĝo:

<http://www.ciudadfutura.com/esperanto>

HEF ANGULO

DEĴOR-HORARO. Lunde kaj ĵaŭde MATENE (9,00-13,00), vespere (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.net.

LIBRO-SERVO de HEF, S-ro Luis Serrano Pérez. Font Nova 32. 08202 Sabadell. Tel. 937 275 021. <luis_serrano@e-milio.com>.

Dank' al Jorge Magdaleno, la ret-aliro de la biblioteko de "Fundación Ortega y Gasset" havas ret-ligilon al la **HEF-Biblioteko**:

<http://www.ortegaygasset.edu/Biblioteca/Enlaces.htm#directorios>.

Estrarkunveno de HEF. (2002-01-26) .

Oni traktis kelkajn gravajn punktojn, inter kiuj troviĝis la plibonigado de la ret-aliro de HEF, la eldonado de la grandega verko de Fernando de Diego, t.e. hispana-esperanto vortarego, kiu estos unu el la plej ampleksaj kaj elstaraj de la tuta e-movado (pli ampleksa ol PIV), la ŝanĝo de la UEA-ĉefdelegito en Hispanio, ktp. Oni traktis ankaŭ la organizadon de kelkaj gravaj venontaj E-kongresoj en Hispanio, inter kiuj troviĝas tiu de la jaro 2003 en Valencio, centjariĝo de la E-asocioj hispana kaj valencia. (A. Casquero)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3°-7 Tel. 91 446 80 79.

Bazaj kursoj:

ESCUELA POPULAR DE PROSPERIDAD. Instruas Toni Cebrián. Luis Cabrera
19. 28002 Madrid. Tel. 91 562 70 19. Merkrede 20,00-21,30 horo

UNIVERSIDAD AUTÓNOMA DE MADRID. Marco Trevisán

Lunde kaj merkrede 12-13h. Tel. 915 617 613

Kurso por triaĝuloj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18.

Prelegoj:

18^a de februaro. 19,00h Lumbildoj komentitaj:

Hispana folkloro: sen kornaj "bovinoj" .

18^a de marto. 19,00. Lumbildoj komentitaj

Hispana folkloro: karnavalo.

La kotizo de MEL por la jaro 2002 estas 12,00 euroj

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4^B. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal